# *Unesko-kunsido: agnoski studojn en Latinameriko kaj Karibio*



Kubo partoprenas konferencon de Unesko por subteni la interkonsenton pri  agnosko de studoj kaj diplomoj de supera edukado en la regiono.

Reprezentantoj de la registaroj de la teritorio, observantoj kaj internaciaj organismoj, kunsidas ?i-sabate en la Palaco San Martín, en la ministerio pri eksteraj rilatoj en la argentina ministrejo, por skizi strategiojn kaj aprobi la tekston de la nova interkonsento, celanta rekoni la studojn pri supera edukado en Latinameriko kaj Karibio.

En la kunsido oni analizos  la defiojn  de movebleco en la supera edukado en tiu ?i kontinento, inkluzivante la kvalitan certecon, krom la diskuton rilate la enhavon de la nova intertrakto.

Temas pri normo por validigo de studoj, titoloj kaj diplomoj de supera edukado, kiu trairis longan analizan procezon cele al adoptado de interkonsento de dua generacio, kiu aldonas konceptojn kongruajn al la defioj de la 21-a jarento, kiel la perspektivoj de genro, homaj rajtoj, rifu?intoj kaj  forpu?itoj. ?i anka? agnoskas malsamajn konceptojn kiuj respondas al la regiona diverseco.

---

[https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/cultura/195795-unesko-kunsido-agnoski-studojn-en-latinameriko-kaj-karibio](https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/cultura/195795-unesko-kunsido-agnoski-studojn-en-latinameriko-kaj-karibio)

**Radio Habana Cuba**